

LA **PROGRESO**



OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—; fremdlando Kĉ 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ŝparkaso Praha: N-ro 34.271.

Ni invitas vin partopreni al la

ESPERANTO-TAGO

en Pardubice

la 27.—28. Junio 1930

okaze de

la Ekspozicio la Kor **Kultura**
kaj Sporto.

S. bate:

20 h. Amuza vespero kun arta pro-
gramo en Ĥemeslnicko-ĥivnostenská
Beseda, apud Urba teatro.

Por aktivaj laborantoj: Kunsido
por preparoli urĝajn aferojn samtem-
pajn kaj projektojn aŭtunajn. Ĉeestos
i. a. D-ro Kamaryt, Prez. de ĈAE,
Ing. Scholze, Prez. de GEL, S-ro
Sklenĉka, Ĉefdel. de UEA, repre-
zentantoj de kluboj, Delegitoj k. a.

Dimanĉe:

8—10 laborokunsido en Ĥem.-ĥivn.
Beseda.

10—11 manifestacio en Rotundo de
la Ekspozicio.

11—12 vizito al tombo de D-ro
Schulhof.

12—1 Komuna tagmanĝo.

Posttagmeze: vizito de la ekspoz-
icio.

Sabate jam de la 15 horo deĵoras
samideanoj de Pardubice en la staci-
domo.

Akceptejo en Ĥemeslnicko-ĥivnosten-
ská Beseda apud la Urba teatro.

Bonvolu zorgi, ke la sekvanta anonco
pri la Internacia Libertenpejo aperu
en la plej proksima numero de vialoka
gazeto.

**Mezinárodní letovisko
v Lázních Bělohradě.**

Světová organizace esperantská ve
snaze opatřiti svým členům příležitost
k společnému letnímu pobytu zve na le-
tošní červenec a srpen do Lázní Bělo-
hradu. Půvabné toto místo bylo zvoleno
k návrhu československé kanceláře
jmenovaného svazu a četné přihlášky
svědčí, že volba byla vhodná. V Lázních
Bělohradu budou trávití svou do-
volenou vůdci esperantského hnutí čes-
koslovenského a sejdou se tam někteří
vynikající představitelé zahraničních e-
sperantských středisek. Českosloven-
ským esperantistům skýtá se dobrá pří-
ležitost ztrávití léto ve společnosti
svých zahraničních přátel. Byla vydána
esperantská brožura se všemi informa-
cemi, kterou posílá zdarma zájemcům
Universala Esperanto-Asocio, Hradec
Králové 628.

Ni rekomendas plej varme, ke vi pa-
siĝu vian nunjaran libertenpon dum ĵu-
lio kaj aŭgusto en Lázně Bělohrad.
Uzu la unikan okazon de aĝrabla kunes-
to kun diverslandaj samideanoj kaj la
ĝvidantoj de nia movado.

Dro Stanislav Schulhof:

KANTO DE L' SKLAVO.

Nun mi hele vidas, ke la sorto mia estas alligita al vi per kateno, ke mi nune ĉiam kun vi devos iri, ke mi certe ne sukcesos jam akiri liberecon, mia nova suvereno!

Multefoje mi forĵetis mian plumon; eĉ emblemon vian, stelon kvinradian, en la koro fajron mi estingi penis, sed vi senkompate ĉiam min ekprenis kaj min pluen, pluen trenis, sklavon vian.

Al vi apartenas nune vivo mia, ĉio, kion jaroj lasis en la koro; vin mi nune sekvas kiel somnambulo, tute kontraŭvole, tute sen postulo kaj mi jam ne revas eĉ pri laŭr' kaj gloro.

Kie vi nur prenis tiun sorĉan forton? Vi tra landoj marŝas sen la sang' sur glavoj, sen kanonoj, nur kun via verda stelo, kaj vin malgraŭ tio sekvas sen ribelo ĉiam novaj blinde obeemaj sklavo.

Pli kruelan, ol la famaj uzurpantoj vi alportis al ni en la mondon moron; ili piedbatis homajn liberecojn, de la landoj ŝiris partojn, limojn, pecojn, sed vi ŝiras el la brustoj nian koron.

(Aŭtunaj floroj, 1911.)

VIRO KAJ VIRINO EN LA KULTURO.

Mi legis ie profundopensajn frazojn pri la vira kaj virina principoj en la kulturo. Iam kernon tio havas. Sed al mi ŝajnas, ke aktiva kaj iniciativa estis ĉiam la virina principo.

Mi opinias, ke estis jene: Iam en diluvio Pravivo kaj Pravirino preparis sin por dormi. Li simple kaŭriĝis sur la tero kaj jam estis ekdormonta. Sed ŝi komencis:

Mi scias, al vi ĝi estas egala, kompreneble, vi estas pri ĉio indiferenta,

min io mordos, se al vi io formordus la kruron, estus al vi ankaŭ egale, pri nenio vi zorgas...

Praviro ĉagrene sin turnadis, ekgratis sin malantaŭ orelo kaj diris:

— Ni do suprenrampu arbon.

Kaj ili dormis sur arbo. La viro trankvile sin metis sur la branĉo, liaj manoj pendis unuflanken, la piedoj aliflanken. Sed lia kvieto ne daŭris longe. La konata soprano ekkantis en riĉe modulita kadenco:

Premdoloras ĉi tie terurege, mi tuta estas dolora, ne ĉiu estas tia ligno kiel vi estas, vi povus dormi eĉ pendigita je piedoj, mi malfeliĉulino, nenian ĝuon mi vivas kun vi...

Li ekgratis sin post la alia orelo, peze pensis ĝis li elpensis. Li ŝirkolektis branĉojn, pretigis neston, sternis foliojn kaj ricevis laŭdon:

— Nu, vera miro, ke vi elpensis ion, se mi ne instigadus vin, jam antaŭ longe Magathermium formanĝus vin.

Ree iom da tagoj trankvilaj, pensis la viro.

Vere sole iom da tagoj. Venis pluvoj akvo malsekigis la neston, la Pravirino ree komencis:

— Vi opinias, se vi foje faris neston, ke vi ĝis la morto ne plu bezonas zorgi pri io, akvo falas sur min kiel el kruĉo, sed kompreneble vi eltenas ĉion, vi dormus eĉ en rivereto, nur por ke vi ne bezonu ion labori...

Li ekflamis, gratis sin post ambaŭ oreloj, rampis de la arbo, iris tien kaj reen, trovis kavernon. Ili ekloĝis tie. Li pensis kontente:

— Belan kavernon ni havas.

Sed ho ve:

— Por vi, kompreneble, por vi ĉio estas bona, se ne estus mi, vi ankoraŭ rampus sur arboj. Estas mallume ĉi tie, kiu scias, kio rampas ĉi tie...

Li sidiĝis flanke, sulkis la frunton, prenis du pecojn de ligno, en embarasoj ilin frofis unu kontraŭ la alia, ĉiam pli kaj pli furioze, ĝis li ricevis fajron.

Kaj tiel ĝi daŭrigis. Pelata de la konstanta rekantaĵo „Pri nenio vi zorgas“, li elpensis teksilon, plugilon, ŝipon, veturilon, li mildiĝis virbovon, ĉevalon, li elpensis polvosuĉilon, elektran laviilon kaj radion. Ĉion por Ŝi. Li mem povis bone ekzisti sen tio. Tamen nece-

sas konfesi ke ĉiam, kiam li elpensis ion novan, li sin sentis kontente en tio. Sed li volis poste ripozi, eĉ dion li elpensis, ripozantan deponst la tagoj de la kreado. Sed lia agrabla sento neniam daŭris longe.

Tiel estas pri la vira kaj virina principoj. Sen Ŝi la viro ankoraŭ nun rampus sur arboj.

Sed li havus trankvilon.

Bohuslav Koutník en „Ĉin“ nro 33.

Trad. R. H.

POR KURSANOJ.

Birdoj — trompisto! Fama svisa ornitologo, Richard Imhoof, pruvas per serio de siaj observoj, per kiaj spiritaj kapablecoj distingiĝas birdoj. Li konstruigis en la ĝardeno libere alireblan, sed kontraŭ malbona vetero bone ŝirmatan verandon, kie dum vintro li metadis ĉi-matene nutraĵon al birdoj, precipe muelitajn avelojn, nuksojn kaj aliajn kernojn. Pri ĉi tiuj matenaj kunflugoj de birdetaro eksciis akcipitro, kiu nestis ne malproksime, kaj poste ankaŭ aliaj rabobirdoj. Iun matenon, kiam la birdetaro estis kunfluginta por nutri sin, aperis la akcipitro volante uzi la konvenan okazon, por elserĉi sian viktimon. Sed li ne sukcesis. Paruoj per sia aparta avertsignalo vekis atenton de la cetera birdetaro, ke ĉiuj forflugis ĝustatempe kaj kaŝis sin. Tio ripetigis kelkan fojon. Kaj jen! La paruoj evidentigis apartan talenton de ruzeco. Por resti solaj ĉe la manĝo, ili donis avertsignalojn ankaŭ, kiam la akcipitro nenie estis videbla. Merloj, emberizoj, frinĝoj disflugis, sed paruoj trankvile daŭrigis la manĝadon. Sed ĉi tiu ruzajo sukcesis sole kelkan fojon. La birdetoj ekkonis, ke la paruoj mistifikas ilin kaj ne atentis la avertsignalojn. La akcipitro alfluginte facile ekposedis sian viktimon. Imhoof asertas, ke li tre facile distingis la verajn avertsignalojn de la mistifikaj. Al ĉi tiuj mankis la akcento de efektiva angoro, kion aliaj birdetoj ne tuj rimarkis. Imhoof aŭdinte la avertsignalon de la paruoj alkuris kaj pafis al la rabobirdoj. Baldaŭ komprenis la birdetoj ankaŭ tion, ke la pafilo kaj la pafado ne koncernas ilin. Kiam fine Imhoof sukcesis mortpafi la rabobirdon, la birdetoj avertis sin ankaŭ pri ĝia kadavro, sed la signalo sonis pli kvazaŭ kontente. Fine la birdetaro elpensis ankoraŭ alian ruzajojn. Kiam ĝia bonfaranto ne aperis ĝustatempe, ili donis

avertsignalojn, por ke li elkuru kun la pafilo. Elkurinte li ne vidis akcipitron, sed sian malsatan birdetaron, kiu tre ĝojis pro lia ĉeesto.

El la ĉeĥa: Kariofilo.

Armena. Tataro klopodis sur foirejo vendi ĉevalon, kiu evidente lamiis. Post longa marĉando, blasfemoj kaj ĵurvortoj armeno aĉetis la ĉevalon por cent rubloj, pagis per bankbileto kaj foriris. Sed vilaĝano vidinta la negocadon, alkuris al li.

— La tataro vin trompis, li diris al la armeno, la ĉevalo ege lamiis...

— Ĉe dio la patro, tio estas tute natura, diras la armeno. Mi mem ja lerte enbatis najlon en ĝian hufon, por aĉeti pli malkare.

— La vilaĝano kuris al la tataro kaj diris al li: La armeno vin trompis, li enbatis najlon en la hufon de la ĉevalo, por ricevi ĝin malpli kare.

— Ne estu ridinda, diras la tataro. Mi scias tion, mi mem vidis lin fari tion, kaj mi ĝojis pro tio, ĉar mia ĉevalo efektive lamiis, jam de la naskiĝo.

La vilaĝano miregante pri tia friponeco rapidis konigi tion al la armeno. Sed tiam la armeno levis la manojn al la ĉielo:

— Ĉu tio estas ebla? Ĉu estas eble, ke ekzistu en la mondo tiaj friponoj-trompisto? Kaj mi jam ekhavis riproĉojn de l'konscienco pro tio, ke mi pagis al li per falsita bankbileto!

La respondo ne atendita. Piron, franca verkisto, kiu naskiĝis en Dijon, estis homo tre sprita. Kun li loĝis nevino, kiu zorgis pri li, kaj kiu ne estis malsprita. Iliaj dialogoj estis iafaje ridigaj.

Iutage, la nevino troviĝas apud la kameno kaj la onklo en la najbara ĉambro. Li aŭdas sian nevinojn, kiu, ludante kun la kato, subite diras: „Ha, la malbela besto!“

— Mia nevino, krias Piron, ĉu vi rigardas al la spegulo?

— Ne, mia onklo, vian portreton mi rigardas.

(L. Mdo.)

Slovníky:

- Kühnl-Procházka: Slovník česko-esper., váz. Jediný česko-esp. slovník, 25.000 slov (nová cena) 30.—
- Čánský-Riedl: Slovník esper.-český. Obsáhlý, mnoho slov, i odborných 21.—
- Filip Jan: Velký slovník esper.-český. Obsáhlý, mnoho odvozenin 40.—, váz. 50.—

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

SIDEJO: GENÈVE, SVISLANDO



Servaro: Bibliografia Servo. — Eldona Servo — Ekspozicia Servo — Financa Servo — Gazetabona Servo — Informa Servo — Komerca Servo — Kongresa Servo — Libro-Servo — Reklama Servo — Servo de Respondkuponoj — Oficperada Servo — Hotela Servo — Turisma Servo — Statistika Servo — Vojaĝa Servo.

Teritoria Oficejo por Ĉeĥoslovakio Hradec Králové 628-a.

KIO NOVA EN UEA?

Jarlibro 1931 finpresita, broŝurata kaj en fino de Junio ekspedita al ĉiuj membroj pagintaj la kotizon 1931. Malgranda enciklopedia parto enhavas utilajn sciindaĵojn: paska kalendaro, festoj kun datoj nefiksitaj, kronologio, tempo-tabelo montranta respondan horon al mezeŭropa tagmezo, signo de l' deveno de aŭtomobilo, statistiko pri la nombro de aŭtomobiloj l. l. 1930 en la ĉefaj landoj, ekspozicioj kaj foiroj 1931, tabelo por transformi anglan monon en decimaloj, montabelo (lando, nacia nomo de la mono, nomo en Esperanto, divido, kurzo por 100 en svis, Fr.), kelkaj sciindaĵoj por rilati kun presisto, telefono internacia, la Ligo de Nacioj, la Internacia Labora Organizaĵo, la armado post la milito, la enciklopedioj, lingvaj malplimulto (minoritatoj), lingvoj en Eŭropo, gramofondiskoj en Esperanto, la Young-plano, Internacia Asocio por Internacia Helpa Lingvo en Usono (IALA), varnomoj kaj Esperanto, universala vortaro (4-a aldono akceptita de la Lingva Komitato 1929).

Dua parto Esperantismo enhavas ĉiujn detalajn informojn necesajn por ĉiu aktivo de nia movado: fundamentaj dokumentoj (antaŭparolo al la Fundamento — notindaj datoj — kongresoj), internacia organizo (Lingva Komitato kaj Akademio—Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj — Universala Esperanto-Asocio — Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado) — esperantista gazetaro internacia — Universala Esperanto-Asocio (Centra organizo: komitato, komisiono, honoraj membroj, dumvivaj membroj, teritoria organizo, centra oficejo), Adresaro laŭlanda (naciaj societoj kaj periodaĵoj — institutoj — fakaj grupigoj naciaj — delegitoj kaj vicdelegitoj de UEA — hotela servo: adresoj de hoteloj — lokaj grupoj — reklamoj de entreprenoj) — Faka organizo internacia.

Volumo de 419 paĝoj! Plezure foliumante la indan libron, mi ekmemoras pri amiko-laboristo, multjara membro de UEA, kiu montrante al sia kolekto de UEA-jarlibroj diris kun

ega kontento: „Jen mia biblioteko!“ Kiu el vi karaj legantoj estas membro de UEA, paginta sian kotizon por 1931 ĝoju sincere je la jarlibro; kiu el vi estas membro nepaginta ankoraŭ, sendu al ni senhezite la kotizon por 1931; kiu el vi ne estas ankoraŭ membro, aliĝu senprokraste. Ni tuj sendos al vi aliĝilon kun pagilo kaj kiam ni ricevos vian kotizon, ni tuj sendos al vi la membrokarton kaj la jarlibron. Universala Esperanto-Asocio ekzistas por servi al la esperantistoj; la jarlibroj de UEA donas la ŝlosilon al la servaro. La jarlibro 1931 estas dudeka de la serio kaj vere ĝi ne devas manki sur tablo de ĉiu vera esperantisto.

UEA-delegito vere devus funkcii en ĉiu loko, en kiu vivas almenaŭ unu esperantisto. Forta varbado de novaj lokoj daŭras jam tutan jaron en la tuta mondo. Mankas nur 13 lokoj kaj 2000 lokoj kun delegitoj estos atingitaj. La fakto estas anoncata en „Esperanto“ kaj nun ĉie oni klopodos esti la dumila, ĉar tiu delegito estos speciale atentata kaj la loko fariĝos ĝlora en UEA-esperantujo. Ankaŭ en nia teritorio ni havas sulfice da lokoj ankoraŭ, kie vivas ne nur unu, sed pli multaj esperantistoj kaj tamen ili ankoraŭ ne rekomendis al ni delegiton. Ĉu ne estus bele, se ĝuste en Ĉeĥoslovakujo UEA trovu sian 2.000-an delegiton?

Internacia Libertempejo en Lázně Bělohrad — Julio—Aŭgusto 1931 — Broŝureto kun detalaj informoj finpresita kaj ĝi estis tuj post apero ekspedita al ĉiuj interesigantoj. Mendoj venis ĝis nun el 11 eŭropaj landoj, Ĉeĥoslovakujon ne kalkulante. Al „Heroldo de Esperanto“ ni faris proponon pri regula informado. La unua informa artikolo verŝajne aperos tie jam en la venonta numero. Pere de „La Progreso“ kaj „Marto“ ni volas ĉiam alvoki la enlandajn esperantistojn, ke ili venu dum Julio kaj Aŭgusto al Lázně Bělohrad por saluti la eksterlandajn gastojn. Estas egale por kiuj kaj kiom da tagoj ili povas veni. Ĉiam oni trovos vere internacian societeton. La intencita „Ĉe-kurso“ ne okazos. O. Sklq

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA VII. SOCHAŘSKÁ 333.
NUMERO 37. - MAJO-JUNIO 1931.

2. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis jaŭde, la 7. Majo 1931 en Praha, kafejo Union, Ĉeestis S-roj Ginz, Hromada, Dr. Ditlík, Slavík, Staněk, Sedláček, Sustr. — Senkulpigis sin S-ro Votrubec, S-inoj Herzigová kaj Tarantíková. Leterojn sendis Dr. Kamaryt kaj Sklenčka. Protokolis Hromada. El la programo ni citas la jenajn punktojn:

Membroj. Gis 30. Aprilo 1931 ni havas 199 pagintajn membrojn (UEA en ĈSR 850). Korespondantojn ni havas 23 (UEA Delegitojn kaj VD 443 en 358 lokoj). La kasisto, dissendos nun admonilojn, — Varbado por ĈAE per la kluboj estas preskaŭ nula. — Adresojn de varbotoj sendis 2—3 personoj. Ni denove petas ĉiujn, ke ili plintensigu la varbadon.

Liechtenstein. La kliŝon kium ni farigis pri la dankletero de la registaro, ni pruntas al ICK por publikigo en Heroldo.

Kurso Ĉe-metoda. S-ro Cseh informas nin, ke Saksa Ligo, Germana Ligo en ĈSR havos lian rajtigitan instruiston S-ron Morariu la proksiman aŭtunon kaj vintron. Li demandas nin, ĉu Asocio dezirus uzi tiun okazon de malpli grandaj vojaĝkostoj. Post la debato ni principe akceptas la ideon aranĝi Ĉe-metodan kurson en Praha, eble en Brno kaj Plzeň. Kursomenco ne malpli frue ol en januaro 1931. Ni preferas S-ron Ĉe mem, sed se neeble, ni akceptos S-ron Morariu, kiu estas unu el la plej taŭgaj. Celo de la kurso: propagando ĉefe inter la ĝeinstruistaro de la 3 grandaj urboj. Nepra kondiĉo: Tendenco de la Ĉe-metoda instruisto akcenti gravecon de aliĝo kaj de laboro en ĈAE kaj en la loka grupo.

Propagando. Estis priparolitaj novaj entreprenoj propagandaj, ĉe la vasta publiko, ĉe gazetaro kaj ĉe aŭtoritatoj.

Generala konsulo de ĈSR en Hamburg informas nin oficiale, ke en H. okazas la 23.—25. Majo 1931 la 20. Germana Esperanto-Kongreso.

Plendo. Nemembro plendas, ke ni subskribis la programon de Rada obrodných organizací. Li estas membro de loka grupo kaj

opinias esti „nedirekta membro de ĈAE“. Li „klopodos, ke ni ricevu de la loka grupo pli da protestaj leteroj“. — Ni citas kiel interesan dokumenton pri tio, kiel homoj, kiuj rifuzas kunlabori kiel niaj membroj, tamen emas instigi al protestoj, por trudi sian opinion al asocio, kies membroj ili ne estas.

Ĉsl. eubiotická společnost a Přípravný výbor pro mezinárodní parlament eubiotický v Praze 1932 petas nomi nian oratoron por la kongreso (somere 1932) kaj nomi eksterlandajn laborantojn, kiujn ili invitu por partopreni kaj parolado. Decido nefarita.

Multobliga aparato. S-roj Ginz kaj Slavík traktis kun firmo H. Nekvapil Praha, kiu pruntis al ni, por provi, rotacian aparaton, kies prezo estas Kč 1350. Kvankam ĝi estas multe pli primitiva ol la Instituta Gestefner (por Kč 9000), ĝi taŭgas por niaj celoj. La 10-jara garantia deklaro de la firmo estis al ni donita. Konsiderante la absolutan neceson havi tian aparaton, la kunveno decidis ĝin aĉeti.

Zamenhof - poŝtkartoj. Nia provizo konsistanta el 2000 ekz. estas konservata ĉe E. K. Praha. Ni informas ke ni vendas.

10 poŝtkartojn kun portreto de Zamenhof por 5 Kč.

Membroj niaj rajtas ricevi ilin por ege rabatita prezo 2.20 Kč. Mono estu sendata nek per poŝta mandato (nepre ne!) nek per pagilo de poŝt. spořitelna, sed per la menda letero, en poŝtmarkoj.

Esperanto - Tago en Pardubice. E. Klubo en Pardubice per letero de S-ro Lavička donis al ni deziratan promeson: sekve de tio la petskribo pri la ŝtando estas forsendita. — La landkarton desegnis membroj de Studenta Sekcio. — La (ekspozajoj estos fiksitaĵ sur kartonoj, faris profesia bindisto. La surskribojn faris S-ro Staněk.

Studenta Sekcio. Estis akceptitaj la proponoj de S-ro Sedláček: 1) Aliĝi al SS rajtas studentoj de ĉiuj duaĝradaj kaj altaj lernejoj: ili rajtas esti membroj kun la reduktita kotizo ankoraŭ dum du jaroj post forlaso de sia lernejo. 2) Unu jarkolekto de La Progreso estos abonita por la legejo de Masarykova studentská kolej.

3. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis merkrede de la 10. Junio 1931 en Praha, kafejo Union. Ĉeestis ĝes-oj Ginz, Herzigová, Hromada, Dro Pitlík, Slavík, Staněk, Sedláček, Sustr kaj Tarantíková. — Senkulpigis sin s-oj Brambora, Votrubeč kaj Vondroušek. — Leterojn sendis Dro Kamaryt, Sklenčka kaj Vondroušek. El la programo ni raportas:

Memorandumo. Al la registaro ni sendis memorandumon — laŭ decido de la ĝenerala kunveno — verkitan de Dro Pitlík, kaj enhavanta niajn dezirojn.

Radio. La Radio-Sekcio de ĈAE estas en daŭra rilato kun la Internacia Radio-Servo kaj kunlaboras kun la ĉefaj fakuloj eksterlandaj. Niaj membroj-radiistoj, kiuj ĝis nun ne anoncis al ĈAE sian nomon, estas denove petataj urĝe tion fari. Sen ia prokrasto tion faru ankaŭ la posedantoj de la mallongondaj sendiloj. Ili informu ankaŭ pri detaloj (voksigno ktp.).

Gramofonaj diskoj esperantaj. Laŭ peto de la Komercista Esperanto-Unio en Dresden ni informas la membrojn pri la esperanta disko eldonita de tiu Unio. Detaloj aliloke.

Propagandaj presajoj. Decidite mendi 10.000 flugfoliojn Esperanto-mezinárodní pojítko národů, post event. revizio, pri kiu ni petis aŭtoron s-on H. K. Bouška. La kluboj dezirantaj ricevi senpagan kvanton por sia aŭtuna propagando, bonvolu atenti la ĉirkuleron, al ĝi senditan komence de junio.

Gazetara komisiono de ICK ricevis de nia prezidanto statistikajn ciferojn pri laboro de nia gazetara servo en 1930.

Membroj. Laŭ informo de nia kasisto S-ro Sklenčka, por la jaro 1931 pagis ĝis 15. Junio entute 236 membroj. Krom tio estis pagitaj 39 kotizoj ŝuldataj por diversaj jaroj 1920-1930. Tio okazis sekve de admoniloj, kiuj ankaŭ informis ĉiun membron pri la jaroj, por kiuj lia kotizo estas enskribita en la membro-libro de ĈAE. Ĉiu membro havas do kontrolon pri siaj kotizoj ĉe post 1920.

Ce-kurso en ĈSR. La kunveno ricevis informon pri la vidpunkto de la lernejoj aŭtoritatoj kaj priparolis diversajn eblecojn, kies fina decido okazos en Pardubice, en ĉeesto de la reprezentantoj de G. E. L. (Inĝ. Scholze k. a.)

Studenta Sekcio. S-ro Slavík multobligis varbilon verkitan de S-ro Sedláček; ĝi estis sendita al konataj adresoj de studentoj. Krom

klubo de Praha, neniu klubo plenumis nian peton pri studentaj adresoj, publikigitan sur p. 48. La progreson de nia afero deziras ĉiuj, sed se por celo eminente grava ni bezonas tiel simplan aferon, kiel estas kopio de kelkaj adresoj, ni fiaskas. Aŭ la kluboj tute ne havas studentojn-esperantistojn en sia loko?

Ĝis nun aliĝis 14 studentoj. — La SS ricevis leteron pri kunlaboro el Zagreb kaj ĝi mem zorgos interrilati kun la ceteraj alilandaj organizaĵoj, precipe en Wien kaj Kraków.

Antologio ĉeĥoslovaka. Venis kelkaj (nemultaj) pluaĵoj leteroj, kiuj enhavas ĉefe ĝeneralajn konsilojn pri aranĝo de la libro, sed ne indikas konkretajn tekstojn tradukotajn kaj envicigotajn. Ni dankas al la sendintoj kaj atendas respondojn de la ceteraj ricevintoj de nia ĉirkulero.

Esperanto en komercaj akademioj. Tiu ĉi afero estis pridiskutita kaj decidite fari certajn aranĝojn, pri kiuj ni raportos poste.

Invito al la 21 Germana Kongreso en Chemnitz en 1932 estis al ni sendita kun akcentigo, ke tiu kongreso okazos proksime al niaj landlimoj.

Laboro de F-ino Supichová. Instruista asocio „Říšský svaz učitelstva měšť. škol“ en Praha starigis por instruistoj, kiuj preparas sin al fakaj kaj specialaj ekzamenoj t. n. Poradny. (konsilejoj). Por demandoj pri esperanto F-ino Supichová proponis sian kunlaboron, kiu estis akceptita. Laŭ peto de la administranto de Poradny ŝi verkis unupaĝan informilon pri la materio de la parola kaj skriba ekzamenoj, de la literaturo bezona ktp. La informilo estis multobligita de Poradny por uzo de la instruistoj. F-ino Ŝ. skribis pri tio en instruistaj k. a. gazetoj. Laŭ ŝia peto ni aranĝos artikolojn en profesoraj gazetoj.

Patronoj de I. C. K. estas personoj pagantaj 100 sv. fr. (650 Kč) jare por helpi al nia centra organizaĵo internacia. El nia lando faris tion du samideanoj, Dro Dolak en Spišské Vlachy kaj Inĝ. B. Molnár en Praha. En nia nomo la prezidanto Dro Kamaryt dankis al ili por ĝia malavareco, per kiu ili faras gravan servon al nia internacia movado.

Kontakto kun nia centra organizo. I. C. K. bondeziris al ni pro nia „klare kaj facile superrigardebla raporto“ pri agado 1930 kaj aparte dankis „pro la detala cito pri la daŭra kontakto kun ĝi“.

En ĝia ĉirkulero n-ro 76 I. C. K. atentigas pri la turismaj eldonaĵoj de nia fervoja ministerio

kaj pri gvidlibro de Plzeň; en n-ro 79 ĝi rekomendas imiti nian varban numeron de Bulteno, kiun ĝi nomas „modela“. En la sama n-ro ĝi atentigas pri la gramofona disko kun „Esperanto“ de Bakule-instituto. — Laŭdezire ni sendis al ICK 15 ekz. de Progreso nro 3. kun la presita faksimilo de la esp. letero de la registaro de Liechtenstein.

Esperanto-Taĝo en Pardubice 27.—28. Junio 1931. Por la ekspozicio ni preparis sole materialon, kiu iel rilatas al Esperanto en la servo de la ĉeĥoslovaka turismo. La materialo surkartonita kaj kun surskriboj desegnitaj de S-roj Staněk kaj Petr estis forsendita al Pardubice la 19. Junio. Pro kaŭzo ĝis nun ne konata nia ekspozicia materialo ne estis ĝis fino de Majo instalita sur lokon, kies senpagan disponigon prizorgis D-ro Pitlík. Laŭ privata informo de S-ro Baroch, membro de E. K. Praha, la materialo nun estas jam en la turisma pavilono. Ĉe loka pentristo ni mendis pere de E. K. Pardubice grandan surskribon, sed ne ricevis ĝis nun informon, ĉu la surskribo estis farita. S-ro Sklenčka estis petata viziti Pardubice kaj esplori la staton de la aranĝo surloke. Tuj kiam ni ricevos el Pardubice informon pri la ejo de la sabata vespero, ni sendos invitilojn al ĉiuj kluboj kaj aktivaj orientbohemiaj samideanoj por laborkunsido sabate vespere.

Diversaĵoj. Al S-ro Ljubov en Nový Bydžov ni antaŭ nelonge sendis senpagan propagandan materialon. — Ni danke legis interesan raporton de S-ro Vítek, instruisto en Tisovce, pri lia laboro en la malfacilaj cirkonstancoj de lia loko. — S-ro Kilián, profesoro en Třebíč, estis nomita „reprezentanto de ĈAE“ en Třebíč, kiun taskon li afable akceptis. — Por eldoni la gvidfolion pri Praha ni havigas al ni prezojn de presejoj, por povi presigi tuj, kiam ni trovos personon, kiu verkus la tekston. — Ni sendis gratulan leteron al V. N. Devjatnin en Kiev okaze de la 40jara literatura jubileo de tiu ĉi esperantisto, unu el la plej malnovaj, kunlaboranto de Zamenhof, aŭtoro de multaj esp. poemoj. — Al S-ro G. Warnier, prez. de Esp. Amikaro Rotaria, en Paris nia prezidanto donis la deziratan informon en konekso kun la Rotary-kongreso en Wien.

R. H.

*Vyžádejte si přihlášku a složenku
svazovou.*

ĈEĤOSLOVAKA GAZETARO KAJ ESPERANTO.

Al la gazetoj jam priparolitaj, kiuj regule raportas pri la progresoj de nia afero, aldoniĝas kelkaj pluaj. Dum la lasta tempo venis en niajn manojn multaj artikoloj reprintsitaj en *Lidové listy*, (Praha), en *Horácko kaj Stráž (Třebíč)*, *Český deník* (Plzeň) kaj *Občanské listy* (Nymburk).

Krom tio oni povas legi pri esperanto en tre diversaj gazetoj ĉeĥoslovakaj; ĉi tie ni volas menci sole kelkajn rimarkindajn artikolojn, de ni nun legitajn.

Nový Věstník (Praha) la 25. 5. publikigas longan artikolon pri la vojaĝo de ICK-Delegito Scherer en Ĉinio.

Národní Politika (Praha) havas du bonajn tradukojn el esperanto. La 23. 5. pri la kalendara reformo, trad. de Ed. Kühnl, la 29. 5. pri japana Kulturo de I. Nitobe, trad. de Ejš.

Ruch (Brno) la 5. 6. alportas Litovan fabelon trad. el esperanto de B. Vlčková.

Pri la Internacia Libertempejo okazonta dum julio-aŭgusto nunjaraj en Lázně Bělohrad atentas post la unuaj sciigoj de kelkaj ĉefaj gazetoj de Praha nun laŭ nia scio ankoraŭ *Věstník Práva Lidu (Praha)*, *Rodný kraj (Mladá Boleslav)*, *Podtatranská Slovač (Ružomberok)*, *Mládež obchodu a kanceláři (Praha)*, *Stráž (Třebíč)*, *Nové Slovensko (Trnava)* kaj *Kvítko (Praha)*.

Pravda (Plzeň) 9. 5. — Saluto el Kazakistano, traduko de esperanta letero, kiun sendas el Alma Ĥta laboristoj laborantaj en la fama fervojo Turksib.

České Slovo (Mor. Ostrava) 13. 5. kaj *Dělnický deník* (Mor. Ostrava) 5. 5. skribas pri la vizito de la aŭstralia laborista esperantisto Maguire.

Rozsevač, revuo de junularo de ĉeĥoslovaka eklezio, havas nun en ĉiu numero specialan esperanto-paĝon kun kurso gvidata de prof. Klement Urban.

Družina ĉsl. legiónářů (Praha) la 17. 5. interesiĝas ankaŭ pri la problemoj de internacia lingvo, kvankam ne laŭ nia vidpunkto. Ĝi parolas pri neceso de kreota interslava lingvo kaj pri la neeble enkonduki inter slavoj la „hebrean esperanton“.

O. G.

Jam aperis
la intereseĝa libro de
Jan Welzl:
TRIDEK JAROJN EN LA ORA NORDO.
314 paĝoj, 1 landkarto, 1 foto.
Prezo afr. 35 Kĉ.
Mendu! Mendu! Mendu!

VĚSEM STUDENTŮM-ESPERANTISTŮM!

Přijetím návrhu Esperantského kroužku v Mařarykově studentské koleji v Praze-Dejvicích letošního valnou hromadou Svazu ĉsl. esperantistů byla založena při tomto svazu Studentská sekce, která má soustředit všechny stoupence esperanta studující na středních i vysokých školách.

Program, jež si Studentská sekce vytkla, je tento:

1. Cílevědomá propagace esperanta mezi studentstvem na středních i vysokých školách.
2. Udržování styků mezi absolvovanými studenty-esperantisty.
3. Podpora oficielního vyučování esperantu na ĉeskoslovenských středních a zvláště vysokých školách.
4. Součinnost s jinými ústředními studentskými organizacemi, hlavně s ústředním svazem ĉsl. studentstva.
5. Dosažení toho, aby esperanta bylo používáno jako pomocného jazyka na mezinárodních studentských kongresech.
6. Udržování styků s podobnými studentskými esperantskými organizacemi v zahraničí.

Program zajisté nemalý a velmi významný pro celé esperantské hnutí. Aby však bylo možno jeho splnění dosáhnouti, ješť nezbytně třeba, aby se všichni studenti, kteří esperanto znají neb se otázkou mezinárodního jazyka zabývají, přihlásili do našich řad. Členský příspěvek pro členy Studentské sekce byl snížen na 6.— Kĉ ročně, při ĉemž mají všichni členové tatáž práva, jako ostatní členové Svazu.

Přihlášky i veškerou korespondenci zasílejte na adresu Svazu ĉsl. esperantistů (Ĉeĥoslovenská Asocio Esperantista) v Praze VII., Sochařská 333 s označením: Studenta sekcie. Po zaplacení příspěvku obdrží každý člen jako premii 2 knihy a to: „Svaz národů o esperantu“ a Collinson: „Esperanto a jeho kritikové“.

Zveme vás všechny ke spolupráci!

Svaz ĉsl. esperantistů v Praze:

Za Studentskou sekci

IngC. Vlast. Sedláček.

SCHERER EN ĈEĤOSLOVAKIO.

ĈAE ricevis informon de pluraj gravaj lokoj ĉeĥoslovakaj, ke ili deziras la viziton de ICK-Delegito sro Scherer.

La jamaj invitintoj kaj ĉiuj ceteraj interesigantoj bonvolu nun sen prokrasto informi definitive ĈAE, por kio da tagoj ili intencas havi s-ron Scherer en sia loko.

ĈAE kaj GEL aranĝos la vojaĝplanon en interkonsento kun ICK kaj informos en ĝusta tempo la aliĝintojn pri la preciza tago, kiam sro Scherer estos ĉe ili.

Ni devas atentigi, ke Sro Scherer ne povos fari publikajn paroladojn senpagaj. La honorario estas minimume 10 usonaj dolaroj (350 Kĉ). Krom tio ICK atendas, ke sro Scherer ĝuos la spertitan gastamon de niaj amikoj.

GAZETO POR LA 18-A DE MAJO.

Ĉar la gekoleĝoj ne mendis ĝustatempe la gazeton (ni ricevis entute nur mendon de 258 ekzempleroj), la Laborkomisiono por TAGE laŭ propono de D-ro Dietterle unuanime decidis, rezigni al aperigo de la gazeto, timante kaj la financon riskon kaj la malbonan impreson por nia propagando, se la kvanto de la venditaj Esperanto-gazetoj ne estos sufiĉe granda, por montri la disvastigon de nia movado. Sen sufiĉa garantio ni ne volas riski ion, por ne malutili al nia afero.

Eble ni povos eldoni la gazeton por 1952 kaj je la fino de 1951 denove atentigos pri ĝi, tiam esperante pli bonan sukceson.

D-ro Dietterle, Leipzig.

Radio-kurso el Bratislava gvidata de s-ro E. Waniťsek daŭris kaj finis laŭprograme. Enhavis sume 48 lecionojn, po 2 semajne, 24 en jaro 1930, 24 en 1931. La aŭskultantoj estis el tre diversaj landoj. La sendstacio aŭ la kursgvidanto mem ricevis dum la kurso leterojn el sekvantaj landoj (la unua numero estas nombro de leteroj adresitaj al la stacio, la dua adresitaj al la kursgvidanto). Aŭstrio 7, — Britlando 16, 7. Belgio 3, — Ĉeĥoslovakio 37, 5. Ĉinujo —, 1. Franclando 9, 4. Germanio 6, —. Hispanio 1, —. Hungario 7, —. Italio 2, —. Nederlando 2, —. Pollando 5, —. Svislando 1, 2. Svedlando 1, 2. Entute alvenis 92 korespondadoj al la stacio kaj 19 al la instruanto, kune 111 leteroj.

GRAMOFONA DISKO KUN ESPERANTA HIMNO.

Nun estas haveblaj du diskoj kun la „Espero“.

Generalan plaĉon trovas la bonega Ultraphon-Disko kantata de la horo Bakule. La Bakule-Instituto (adreso: Praha—Smíchov, Mozartova 1246) ricevis kaj plenumis jam multajn mendojn el diversaj landoj eŭropaj kaj el transmaro.

Komercista Esperanto-Unio (Dresden—Radebeul, Friedrich August-Strasse 4) fabrikigis nerompeblan diskon unuflanke kun la „Espero“ ludita de orkestro kaj kun kantata Mozartario en esperanta traduko sur flanko alia.

Bakule-disko kostas en Ĉeĥoslovakio Kč 30.-, en eksterlando dol. 1.30 aŭ dol. 1.50 laŭ la af-ranko. La KEU-disko estas liverata po 1.- dolaro.

Gramofondiskoj kun la voĉo de Doktoro Zamenhof pretaj.

Ĉar la rezultato ne konformiĝas al niaj es-
peroj kaj la teknikaj malfacilaĵoj estis tiel
nevenkeblaj por atingi bonan reproduktadon
de la malnovaj kaj eluzitaj vaksaj cilindroj,
la Eldona Fako de Kataluna Esperantista Fe-
deracio, kiu zorgis pri la reproduktado de
la kara voĉo de nia Majstro, post interkon-
sento kun Internacia Centra Komitato de la
Esperanto-Movado, kiu iniciatis la ideon, de-
cidis eldoni NUR 50 diskojn.

Tiu ĉi malgranda kvanto devos kovri ĉiujn
elspezojn: luo de la fonografa aparato, ma-
trico de la elektraj diskoj, k. t. p. kaj pro
tio la prezo devos esti iom alta kompare al
tiu, kiun oni intencis fiksi, se la provo estus
sukcesinta kaj ni estus povintaj mendi pli
grandan kvanton de la ODEON fabriko. Ni
do fiksas la prezon kaj liveros ĉiun diskon
po dek pesetoj. (35 Kč.)

Plie oni devos aldoni la pakaj- kaj sendel-
spezojn, kiuj valoros proksimume aliajn dek
pesetojn. Tiu ĉi elspezo restos la sama, se
oni mendas unu diskon aŭ dek, ĉar la poŝta
af-ranko kaj la ligna skatolo same kostas al ni.

Ni rekomendas al ĉiuj interesatoj, ke, se
eble, ili centriĝu la mendojn de unu sama
lando, kaj tiamaniere ni povos ekspedi pa-
kajon enhavantajn 10 diskojn kaj ne unu solan,
kaj tiel ili rezultos relative malkaraj.

Interesatoj bonvolu sin turni al Kataluna Es-
perantista Federacio — Strato Duran i Bas 8,
pral. — Barcelona — kaj bonvolu sendi kun
la mendo la koncernen monsumon.

Ni denove atentigas la tutmondan esperan-
tistaron pri tio, ke la reproduktado certe ne
estas ideala, sed tamen ĝi estas la sola ŝanco
posedi la voĉon kaj aŭdi la elparoladon de
nia kara Majstro. Ĝi estas malgraŭ ĉio vera
relikvo por ĉiuj.

Anoncu tuj vian deziron aĉeti la diskon.
Ni ne povas garanti, ke poste ĉiuj povos
ricevi la diskon. La fabriko devigas nin ĉiu-
foje mendi almenaŭ 50 ekzemplerojn. Kiel ni
diras ni nur mendis tiun malgrandan provizon.

Kataluna Esperantista Federacio.
(Eldona Fako.)

X-a Internacia Tendaro de la Skolta Espe-
rantista Ligo okazas la 14. ĝis 20. Julio 1931.
La tempo de la tendaro estas tiel difinita, ke
la partoprenantoj povos partopreni en Krakow
la pedagogian esperanto-kurson de sro Andreo
Cseh, samloke la universalan kongreson de Es-
peranto aŭ la Internacian Konferencon de Skolt-
gvidantoj en Wien kaj post tio eble la inter-
nacion roveran tendaron en Kandersteg, Svis-
lando. La tendaro estos en la skolta parko
de Hárshegy, kiu etendiĝas sur la teritorio de
Budapest inter la arbaroj kaj montoj de Buda
sur proksimume 30 akroj. La parko estas atin-
gebla en 45 minutoj el la centro de la urbo
per tramvojo. La tendaron aranĝas la Skolta
Esperantista Ligo, tendarestro estos s-ro Norman
Booth, Hon. Generala Sekretario de la Ligo.
La Hungara Skolta Asocio kune kun la Hungara
Skolta Esperanto Rondo aranĝos la preparajn
laborojn kaj estos al la tendarkomandantaro
krom la preparoj per disponigo de helpantoj
por fari la lokajn teknikajn, nutradajn, k. t. p.,
aferojn, ĉiam servopreta. En la tendaro povas
partopreni ĉiu skoltgvidanto kaj knabskolto,
kiu apartenas al skoltligo rekonata de la Skolta
Internacia Kontoro, London, (el Germanlando
ankaŭ la membroj de Deutscher Pfandfinder-
verband kaj Deutsche Freischar). Interesiĝantoj
kaj partoprenantoj petu aliĝilojn rekte de
la organiza komitato, de kiu ili ricevos tiujn.
La pleniĝitajn aliĝilojn oni devas stampigi per
sia propra skolta ligestraro kaj resendi al Bu-
dapest plej malfrue ĝis la 1-a de Julio
1931. Kun la definitiva aliĝo ensendu du inter-
naciajn poŝtmark-respondkuponojn por kovri la
poŝtelspezojn. Zorgu, ke el via lando venu parto-
prenantoj! Kostoj. Po tage kaj po persone
3 pengoj, en kiu sumo enestas matenmanĝo,
tagmanĝo kaj vespermanĝo, loĝigo en la ten-
daro, la polica sinanonca kosto, sed ne enestas
la elspezoj de veturadoj, banado kaj vizito de
vidindaĵoj. Supra kosto devas esti por la tuta

tendaro pagota tuj la tagon post la alveno al la kaso de la tendaro. Vojaĝaj rabatoj. Se kune vojaĝas dek skoltoj — inter ĉiu dek povas esti unu pli aĝa, ol dudekjaraj! — la partoprenanto ricevos sur la linioj de hungaraj, aŭstriaĵ, germanaj kaj svisaj fervojoj kaj sur la ŝipoj de la Danubo 50%, sur la linioj de ĉeĥoslovakaj fervojoj 33% rabaton por la al- kaj revojaĝo. Por akiri la rabatojn oni devas sciigi la precizan nombron, vojaĝplanon kaj vojaĝdaton de la grupoj al la organiza komitato, kiu prizorgos la rabatojn. La rabatiloj kostos verŝajne po persone kaj po lande unu respondkuponon. Pasporto kaj vizo necesaj. Por viza pago 50% rabato promezita. Adreso de korespondo: Dum la preparado: Organiza Komisiono de SEL tendaro; Nagy Sándor-uca 6, Budapeŝt, V., Hungarlando. Dum la tendartempo: Esperanto Tendaro, Hárshegyi-ut 5., Budapeŝt, I., Hungarlando.

REDAKCIA.

Laŭ la instiĝo de niaj abonantoj, kiuj ne deziras havi dumonatan paŭzon dum julio kaj aŭgusto, ni aranĝis la eldonadon tiel, ke la 5. nro aperu 15. Junio kaj la 6. nro fine de Julio. La 7. nro aperos komence de septembro. — Tiu ĉi 5. nro prokrastiĝis je 8 tagoj pro la Esperanto-Tago en Pardubice.

Pro manko de loko kaj abundo de diversaj necesaj informoj ni devas ofte prokrasti diversajn rubrikojn. Se nur parto de niaj abonantoj varbus po unu abonanto nova, ni povus aperi pli amplekse. Kondiĉe ke ankaŭ — niaj ŝuldantoj pagos.

Efektive, spite de tio ke ni dufoje almetis pagilojn kaj en ĉiu numero al ŝuldantoj enmetis admonilon, ni estas devigataj ankoraŭ en tiu ĉi nro (en junio!) enmeti novan admonilon kun ĝentila peto pri pago. Tiom pli multe ni dankas al tiuj, kiuj jam faris sian devon.

R. H.

Se vi trovas en Progreso vortojn, kies ĉefan signifon vi ne konas nek povas trovi en la vortaro Hromada—Petr, ne bedaŭru poŝtkarton kaj sendu al ni ilian liston. Ni volonte vin informos. Samtempe vi tiel helpas ĉe preparado de la nova eldono de tiu ĉi vortareto, kiu trovis tian plaĉon, ke ĝi estas jam disvendita.

Leteroj pri la artikolo de NULO. Krom la jam publikigita letero de sro Sustr venis kelkaj pliaj. Ni publikigos ilin venonte.

Sro Otto Ginz de la 8. julio ĝis 8. aŭgusto ne estos en Praha. La skribintoj dum tiu tempo bonvolu pacienci.

EL I. C. K.

Tagordo Laborkunsidoj Krakovo.

Por doni bazon al seriozaj laborkunsidoj en la Universala Kongreso en Krakovo, ni petas sendi al ni ĝis plej malfrue la 15. julio utilajn sugestojn pri gravaj temoj diskutotaj en la tagordo de la kongreso. Ĝis nun estas antaŭvidita temo pri gazetaro, radio, filmpropagando, internaciaj rilatoj kaj Esperanto.

Ni ankaŭ petas rekomendojn pri samideanoj kapablaj kaj pretaj fari paroladojn (maksimume 15 minutojn) pri aktuala temo de nia propaganda kaj praktika laboroj, taŭga por kaŭzi fruktodonan diskuton.

Bagatelaj kaj flankaferoj ne estos konsidereblaj.

Propagando Krakovo.

Post iom pli ol 1 monato ni festos la Dudektrian en Krakovo. La preparoj daŭradas sukcese. La varbado intensiĝas pli kaj pli.

Ni tre kore petas al ĉiuj samideanoj, precipe al la kluboj helpi al la propagando por Krakovo laŭ plej bona povo. La ekonomia situacio en Eŭropo estas malbona, des pli necesas instigi al partopreno ĉiujn, kiuj vere kapablas ĉeesti kaj sukcesigi la tutan aranĝon.

De la sukceso de l'kongreso dependas la plia progreso de Esperanto en Polujo kaj la efiko de nia internacia laboro, koncentrita sub la direkto de ICK.

Ĉu vi jam aliĝis al la Krakova kongreso? Ĉu vi scias, ke la veturkostoj el nia limstacio Petrovica al Kraków estas sole 50 Kč (3. kl. rapidv.) por ambaŭ vojaĝoj, ĉar la polaj fervojoj donas 50% rabaton?

Mondvojaĝo Scherer.

La anonco pri la Eŭropa vojaĝo de speciala delegito de ICK, Sro. Scherer en kelkaj landoj alportis tiom da invitoj, ke antaŭvideble ne sufiĉos la restadotempoj indikitaj.

Pro tio ICK deziras atentigi, ke ekzistas ebleco de plilongigo en kelkaj landoj kaj eĉ pri la tuta restado en Eŭropo, kondiĉe, ke la necesa vojiro certigu financon sukceson de ĉio.

ICK. rekomendas al ni akcepti ĉiujn pliajn invitojn sen devigo pri dato.

Tuj kiam ICK. scios pri ĉiuj invitoj, ĝi starigos definitivan programon, konsiderante la

dezirojn, sciigatajn al ĝi de la Nac. Societoj, kiuj starigas la programon por sia lando.

Por la landoj ne viziteblaj de Sro. Scherer alia aranĝo estas preparata. Detaloj estos sciigitaj je taŭga momento.

Modela varbnumero.

Por intensigi la varbadon kaj regajni malnovajn membrojn la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista eldonis vere imifindan specialan numeron de sia organo „La Progreso“ (senpaga aldono al No. 10, jaro XI), kiun ni tre rekomendas al interesitoj kiel modelon. Ekzemplero estas ricevebla de la administracio, Sochaŭská 333, Praha VII.

(El cirkulero No 79. de I. C. K. Genève.)



PĚKĻAD 28. TEXTU.

Překlad 28. textu zaslali: sl. Št. Bálková Praha, sl. M. Feidmannová Zlaté Moravce, p. Jar. Hladký Karvinná, Esp. Klubo Hradec Králové, L. Jakoubě Velké Hamry, Jiří Kořínek Brno, Ant. Kubásek Plzeň, sl. L. Mertensová Dol. Kounice, St. Moc Malá Bělá, Fr. Pytloun Bakov, pí B. Raichlová Náchod, Val. Rosypal Háj, Al. Štěpán Hostivař, celkem 13 osob. — Ze 4 nejlepších překladů vylosovali jsme práci p. Jar. Hladkého z Karvinné, kterému zašleme knižní odměnu.

Na žádost z řad účastníků těchto překladů jsme ochotni zdarma opravit a vrátit překlad tomu, kdo přiloží 3 korunové známky na výlohy. Těm, kteří tak učinili již při překladu 28. budou jejich práce opravené zaslány po vyjití tohoto čísla.

1. Sole la homo, kiu vere kredas je io,1) havas fortajn nervojn,2) kaj ne svenas en malfavoraj cirkonstancoj;3) li ne timas konfesi, ke estas malbona vetero por lia afero,4) ĉar li havas la varmon en si;5) sed la homo malfirme kredanta aŭ dubanta bezonas,6) por ne forkuri de la afero,7) favorajn cirkonstancojn eksterajn, hejtitan ĉambrom en la mondo,8) oportunan vojon kaj rozakvon por siaj esperoj.9)

2. Malgranda nacio povas sukcesi en konkurado de la grandaj nacioj sole tiam,10) se ĝi siajn proprajn farojn juĝos per tre severaj mezuriloj,11) kaj se ĝi havos vidpunkton severe kritikan al ili.12)

3. Pri unu afero mi estas certa, nome,13) ke la salajroj ne povas esti esence malaltigitaj,14) sen sekvo de katastrofo.15) La profitoj, kiujn kreas la kapitalo,16) ne venas sole el amasa produktado,17) Paralele kun la produktado devas iri la konsumado,18) kaj pro tio estas necese, ke ekzistu (potenca aĉeta povo,19) kreita per liberalaj salajroj.20) Ĉiu radikala redukto de la aĉeta povo estas tuj sekvata de malaltiĝo de la profitoj.21) Laŭ la sama regulo la profitojn oni povas stabiligi pagante ĉiam pli bonajn salajrojn.22)

Poznámky.

Číslice v textu týkají se tentokrát nejen slova, u kterého jsou, nýbrž celé části větné mezi ním a číslem předcházejícím.

1) též: efektive kredas; věřiti v to neb ono = věřiti v něco (je io, ion). Někteří přeložili doslovně „je ĉi tio aŭ tio“, též „kion ajn“. Jiní: „kredi tion aŭ alion“ (rozumný tvar utvořený analogií ki-o, ali-o, ale Zamenhofem neužívaný), dále „aliion“. Všechny tyto tvary jsme připustili.

2) překlady, ve kterých jsme četli: „posedas“ místo „havas“, „sanforta“ místo prostého „forta“, „nervosistemo“ místo „nervoj“, se nám nelíbily. Nejsou o nic jasnější, zato však těžkopádné.

3) též: „ne falas en sveno“, „ne falas svena“; prostému „en cirkonstancoj“ dáváme přednost před „Dum“, „Sub“, „Inter“.

4) „špatné počasí“ stačí prostě „malbona vetero“; můžeme však vyjádřit v esp. dalšími čtyřmi slovy, podle toho, zda špatnost toho počasí vidíme v tom, že není taŭga, konvena, favora, bela por nia afero; maltaŭga, malkonvena, malfavora, malbela. — Říkáme přece „nia sankta afero“ a nikoli „objekto“ nebo „fakto“; tedy i zde „por lia afero“.

5) „la varmon“, poněvadž rozumíme: to teplo, které není mimo něho, má on v sobě.

6) zato je též: „kontraŭe“, „male“. Nikoli „kontraŭ“, „post tio“. — Též: „malforte kredanta“. Neužívejte tvarů jako: „ŝancelkredanta“! — Někteří užíli slov: „kredema — dubema“. Proč? Zde se přece mluví o určitém člověku, který věří — pochybuje, kiu kredas — dubas, tedy kredanta — dubanta.

7) Zde pouze „por ke“, jelikož je to věta účelová: člověk potřebuje příznivých vnějších okolností, proč? Aby od věci neutekl: por ke li neforkuru... nebo, jelikož v obou větách je stejný podmět: „por ne forkuri“. Prosté „ke“ místo „por ke“ uvádí věty předmětné. Na př.: Co potřebujeme? Potřebujeme, abyste

od věci neutekli. Ni bezonas, ke vi ne forkuru de la afero. Ni bezonas, ke ĉiu el vi varbu unu novan abonanton de La Progreso. Ni bezonas, (kion) ke vi tion faru, (kial?), por ke via gazeto povu ekzisti. Místo forkuri též „fugi“.

8) vytopený pokoj = hejtita ĉambro; „Varmigita“ nestačí, pokoj může být oteplen též na př. sluncem, zde však (stojí „vytopený“, t. j. ohřátý kamny, čili hejtita, event. elhejtita, ačkoli my zde předponu el považujeme za zbytečnou. Nesprávné jsou ovšem tvary „ekhejtita“ (ek značí začátek nebo okamžitost děje). Hejtata ĉambro = vytápěný pokoj.

9) pohodlná cesta = též komforta vojo. La komforto ne ĉiam kuniĝas kun lukso. (Gr. M. Pl. V.). V tekstu: pohodlné cesty, růžové vody je přece 2. pád po slovese potřebovatí, proto naprosto nesprávně někteří přeložili množným číslem: vojojn, akvojn.

10) obstatí v soutěži = sukcesi, prosperi en konkurado, en konkurenco (= komerca konkurado); nevhodné zde: persisti = vytrvati, kontraŭstari = peni por malhelpi. — Jenom tehdy = sole tiam, proč těžkopádně „tiuokaze“? (třebaže mluvnický správně).

11) výkon jest zajisté „aĝadrezulto“ = rezulto de aĝado, zde ale stačí faroj, agoj. Posuzovatí měřítky: per, laŭ mezuriloj, nikoli „kun“.

12) též: se ĝi rigardos ilin el vidpunkto... též: se ĝi havos por ili vidpunkton; krajně = též „ekstreme“ (v krajním případě = en ekstrema okazo).

13) být si jist něčím = esti certa pri io; v něčem = en io. — Místo „nome“ též: tiu (t. j. la unu afero) estas. — Podstatně snížití = (též) grave malalĝi.

15) Añž by to vedlo ke katastrofě... bylo, zdá se, nejobtížnější místo překladu. Kromě hořejšího „sen sekvo de katastrofo“, jasný je též překlad: „ĉar tio ĝvidus al katastrofo“, „ĉar tio sekvigus katastrofon“, „sen katastrofa sekvo“, „por ne kaŭzi, (sekvigi) katastrofon“. Uznáváme při hodnocení překladu též novotvar: „sen ke tio ĝvidu...“ Ostatní překlady méně vhodné.

16) nikoli obráceně: la profitoj, kiuj kreas kapitalon.

17) hromadná výroba = amasa produktado. Fabrikado = tovární výroba. „Kolektiva“ hledí ke způsobu práce, „amasa“ k výsledku jejímu. Ampleksa = rozsáhlý. Amasigita = nahromaděný.

18) Proč „progresiri“ místo prostého a plně vystihujícího „iri“? Varuj se zbytečných

složenin! — Podobně „proto“ = pro tio, tial, a není potřebí říkatí zde „tiuokaze“. Mluvnicky jsou všechny tři případy správné, stylisticky dáme přednost prvému.

19) aby zde byla = „ke ekzistu“, též „ke estu ĉi tie“, ale nikoli „ke jen estu“. „Jen“ není totéž jako „tie ĉi“! Příslovoem Jen oznamujeme, ohlašujeme něco, na co zvlášt upozorňujeme: Jen floroj por vi (hle, květiny pro vás), Jen kion mi ŝuldas (hle — zde máte — co dluhuji), Jen mi! (hle — zde jsem!). Jen por unu fojo ŝi malĝajigis (tu pojednou sesmutněla). — Kupni síla = aĉeta povu, Oni havu bonan salajron, por ke oni povu aĉeti, por ke oni havu povon aĉeti = havu aĉetan povon. Kapableco = schopnost, nikoli možnosť (= povu). „Aĉetema“ je zde nevhodné.

20) V tekstu je „vytvořená“, proto přeložíme „kreita“ a nikoli: „Farita“ (udělaná). Elkreita má zbytečnou předponu „el“. „Kreinta, elkreinta“ jest ovšem úplně chybně = vytvořivši a nikoli vytvořená. Krei = (vy)tvořiti, kreigi = dáti utvořiti.

21) má v zápětí = estas tuj sekvata, nebo „tuj sekvigas“. Pokles zisků = malaltiĝo de la profitoj, též: redukto, malleviĝo, malpliĝo.

22) též: la profitoj estas stabiligeblaj per pagado de ĉiam pli bonaj salajroj.

29. TEXT K PŘEKLADU.

Rozumí se samo sebou, že resoluce mezinárodních kongresů nepřestaví svět. Ale hnou jím přece jen někdy. Osmihodinná práce byla původně také jen v resolucích mezinárodních kongresů; a takových věcí by bylo možno vypočítati veliké množství, netušené množství. Leccos, co dnes je samozřejmé, bylo kdysi nutno vkládat do resolucí mezinárodních kongresů. Mínění, projevené v resoluci právě usnesené nějakým kongresem, je dnes jen míněním — papírovým projevem. Ale jen zdánlivě. Na ten papírový projev se navěsí v různých koncích světa další projevy, které se na budou odvolávat. A jako ta klasická kapka vyhloubí skálu častým dopadem, tak se i ta mezinárodní resoluce dřívě nebo později častým opakováním zpravidla stane skutečným požadavkem. Leccos ovšem zmizí, zapadne. Mezinárodní kongresy nepracují hospodárně. Ale nemyslíme, že by bylo možno proto říci, že celá tato instituce je nehospodárná. Mezinárodní život je příliš mladý a jeho tradice se vlastně stále ještě tvoří, někdy oklikami.

Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze čís. 238.888/VI-23.

Eldonanto kaj responde redaktoro RUDOLF HROMADA. - Presis JAN MINÁŘ NYMBURK.